

ESPERANTO-INFORMILO



Rubrikoj ĉi-
numere:

- Programo
- El la klubo
- Literaturaĵo
- Vindindaĵoj
- Diversaĵoj

Inter 93,5 kaj 99,4 % de la genaro de simioj kaj homoj samas (rim.: tio estas averaĝe pli ol la nepra kongruo inter la genaroj de du homoj!). Ankaŭ simioj planas militon, uzas ilojn, kiujn ili stokas por iam uzi ilin denove, povas lerni paroli kun homoj per gestoj de la gestolingvo kaj tiel eĉ povas komuniki abstraktajn faktojn. Jes, la inteligenteco de simioj estas iom malpli granda ol tiu de homoj (en multaj taskoj iliaj rezultoj tamen kompareblas al tiuj de 2,5jaraĝaj infanoj) – sed la komunaĵoj inter la diversaj hominedoj estas pli grandaj ol la diferencoj. Tamen popoldecido en Bazelo (CH) nun decidis negative pri la demando, ĉu simioj havu bazajn hom(ed)ajn rajtojn.

© ĉe PavanPrasad_IND sur Pixabay

Kolofono

redaktoro: Anina Stecay
as.esperanto@web.de
korektintoj: R. Pflüger
W. Ullmann

Esperanto-Gesellschaft Frankfurt am Main

www.esperanto-frankfurt.de
Vorsitzender: Georg Hennemann
Rehgartenstr. 16
35683 Dillenburg
Tel. 02771-8196614

Bankverbindung:

Esperanto-Gesellschaft F.a.M
IBAN: DE75 5008 0000 0771 5717 01
BIC: DRESDEFFXXX
bei: Commerzbank Frankfurt

Jahresbeitrag

mit DEB-Beitrag: 96 €
Familienmitglied: 48 €
Nur ESF: 24 €
Familienmitglied: 12 €


Programo

Klubvespero

Klub-Abend

Dienstag, d. 15. März 22

mardon, la 15-an de marto 22



© ĉe Aenigmatis-3D sur Pixabay

19:00 h per Zoom

19:00 h per Zoom

Spieltheorie (A. Stecay)

Ludoteorio (A. Stecay)

Die Spieltheorie ist eine auf mathematischen Überlegungen basierende Theorie der Entscheidungsfindung. Unser verstorbenes Klubmitglied Prof. Reinhard Selten erhielt für seine Beiträge zu diesem Gebiet (zusammen mit John Nash und John Harsanyi) 1994 den Alfred-Nobel-Gedächtnispreis für Wirtschaftswissenschaften. In diesem Zoom-Vortrag werden die Grundzüge der Spieltheorie erklärt – denn die Theorie berührt unsere grundlegenden, alltäglichen Entscheidungen, auch ohne Kenntnisse der höheren Mathematik!

Ludoteorio estas teorio pri decidoj baziĝanta sur matematikaj principoj. Nia forpasinta klubano prof. Reinhard Selten ricevis pro siaj kontribuoj al tiu sciencokampo en 1994 (kune kun John Nash kaj John Harsanyi) la Alfred-Nobel-memorpremio pri ekonomiko. En ĉi tiu Zoom-prelego la fundamento de ludoteorio estos klarigita – ĉar la teorio tuŝas niajn bazajn, ĉiutagajn decidojn, eĉ sen konoj de alta matematiko!

Achtung, die **Jahresmitgliederversammlung** wird – wieder mal wegen der Pandemie – dieses Jahr voraussichtlich im Mai (17.5.) stattfinden. Der **Sommerausflug** nach Seligenstadt (Kloster mit Heilpflanzengarten & kleine Altstadt) findet nach dem momentanen Stand im Juni statt.

Atentu, ke la **membrarkunveno** okazos – denove ŝuldite al la pandemio – verŝajne en majo (17.5.). La **somera ekskurso** al Seligenstadt (monaĥejo kun kuracplanta ĝardeno & malnova urbeto) okazos laŭ la momenta plano en junio.

Genauere Infos folgen!

Detalaj informoj sekvos!

Naskiĝtagoj

En marto festos siajn naskiĝtagojn:

Ullmann, Walter 06.03.

Westerhoff, Bernhard 30.03.

Ni kore gratulas!

Literaturo

La kesto de Pandoro

de Felmano Ulriko

Ĉu la vivo ne belas?
Povus esti pli interesa.
Ni havas ĉion!
Nu, ĉiutage berojn, kaj foje viandon de mamuto.
Kaj ĉiam la sama pejzaĝo!
Plaĉas al mi ĉi tie.
Mi volas loĝi en la najbara valo.
Tie loĝas la fajroŝtonuloj.
Se mi inventus klabon... mi povus ilin fortimigi!
Kian teruraĵon vi diras! Al kio tio gvidus?
Al pli bona vivo!
Ĉu vi poste kontentus?
Nu, povus esti pliaj ideoj... la rado.
La rado? Kia frenezaĵo! Al kio tio gvidus?
Al pli bona vivo!
(Kaj tiel ili daŭrigis, elpensis ilojn kaj armilojn,
skribon kaj piramidojn, ornamaĵojn kaj sklavojn,
delikataĵojn kaj ekscesajn festojn, katapultojn kaj
akvokondukilon, la tramon kaj zepelinojn,
kanonojn kaj centran hejtsistemon, aŭtomobilojn
kaj energicentralojn, pasaĝeraviadilojn kaj
rapidmanĝejoj, altdomegojn kaj nukleajn
raketojn, televidon kaj surlunigon, robotojn kaj
grandegajn futbalstadionojn, artifikajn intelektojn
kaj klimatoŝanĝiĝon...)

Halt'!
Kio?
Tio ne finiĝos bone!
Hm. Aspektas iel strange...
Mi ne ŝatas, kion mi vidas.
Vi pravas. Iel la tuto akcelas al nebono...
Ĝuste. Mi proponas, ke ni ne faru klabon. Beroj
sufiĉe bongustas.
Jes. Kaj mamuta viando ne tiom malbonas. Do, ni
ne malfermu ja keston de Pandoro!
Kion?
Hm. Mi ne scias. Mi havis tiun ideon pri kesto,
plena da ideoj...
Kesto? Kio estas kesto? Kaj kiu estas tiu Pandoro?
Hm... forgesu ŝin. Forgesi pri kio?
Mi dormemas. Suno ĵus malleviĝis.
Jes. Bonan nokton! La keston ni ne malfermu.

Unukornula kaverno

Artikolo de W. Ullmann

En la germana magazino DER SPIEGEL n-ro 28/2021, p. 102, aperis artikolo sub la nomo „La sekreto de la unukornula kaverno“.

Germanaj arkeologoj trovis piedfingran oston de grandega cervo, en kiu oni enranĉis plurajn rektajn liniojn en preskaŭ ortangula maniero. La gravaĵo pruvas ke la metiistoj kapablis planadon, konsciencan laboron kaj komprenis geometrion. Laŭ analizo la osto aĝas minimume 51.000 jarojn.



Enirejo de la unukornula kaverno, Herzberg, kun la unukornula skeleto.

foto de Norbert Kaiser CC BY-SA 3.0

Post la legado de la artikolo mi memoris, ke mi en la jaro 2012 estis jam en tiu kaverno. La okazo estis mia partopreno en la Internacia Fervojista Kongreso en Herzberg kaj mia ĉeesto – kvankam LKKano - en la vizito al tiu kaverno dum duontaga ekskurso. Tiam oni disdonis antaŭpreparitan tradukon de la ekzistanta prospekto pri tiu kaverno, kiun mi nun „elfosis“.

Certe vi scias, ke la menciita besto neniam ekzistis, kvankam estas homoj, kiuj nur venis al la groto pro sia kredo al la ekzisto de la unukornulo.

Dum multaj jaroj oni elfosis ostojn el tiu kaverno kaj uzis ilin en tuta Eŭropo kiel kuracilon. Tiuj ostoj venis de bizonoj, kavernaj leonoj kaj ursoj. La sciencistoj diskutis nun pri la trovaĵoj: oni estas konvinkita, ke la prilaboritaj aĵoj ne estas kopio aŭ imitado, sed devenis de la homoj, kiujn oni nomis Neandertalulojn.

Antaŭ la enirejo de la kaverno troviĝas artefarita skeleto de la unukornulo kaj apude estas gastejo, nomata „Baude“, kie ni tiam trinkis ion.

La funkciiganto de la gastejo estas *Gesellschaft Unicornu fossile e.V.* en Osterode/Harz.



Logo de la klubo, © ĉe la klubo

La groto estas malfermita de aprilo ĝis oktobro ĉiutage krom lunde. Oni ofertas ankaŭ gvidadojn. La kaverno ekzistas sub tiu nomo ekde 1762. Ĝi troviĝas en la urboparto Scharzfeld de Herzberg. La informilo de la kongreso menciis la viziton kaj konkludis ke temis pri „entute alloga ekskurso“.

Fontoj: SPIEGEL n-ro 28/21 & prospekto „Einhornhöhle“ (germ)

Denove pri moneroj ...

... sed ĉi-foje espereble senerara...:

Sur tablo kuŝas 100 moneroj.

Vi estas blinda kaj krome ne povas subtile palpi, sed vi scias, ke inter la moneroj estas 37, kiuj montras la kapon, kaj 63, kiuj montras la nombron supre. Ĉu vi povas, sen vid- kaj palpkapablo kaj sen kromaj iloj, dividi la monerojn al 2 grupoj tiel, ke en ambaŭ grupoj la kvanto de moneroj, kiuj supre montras la kapon, estas same granda?



(Tiun ĉi enigmon prezentis Holger Dambeck en Der Spiegel 28/11/21, sed mem prenis ĝin el la forumo matheboard.de)

Solvo de la februara enigmo

Mi pardonpetas, ke mi mistajpis dum la tradukado de la februara enigmo kaj krome aldonis eraron! Du homoj atentigis min, ke io malĝustas en la klarigo. La ĝusta teksto devus esti: **Betty rajtas preni 1-8 monerojn, Bernd rajtas decidi inter 4-11 moneroj.** Krome, la regulo estas ke gajnas ĝuste tiu, kiu **JES prenos la lastan moneron.**

Tiam la solvo estas, ke ĉiam la ludanto (1), kiu unue prenas ajnajn monerojn, povas gajni la ludon. Li/Ŝi prenas dum la unua vico 4 monerojn (tiam restas 96), kaj dum la aliaj vicoj ĉiam prenas ĝuste tiom, ke kune kun la kontraŭanto la moneroj adiciiĝas al 12. (T.e.: Betty prenas 4 monerojn en la unua raŭndo, kaj Bernd prenas 7, tiam Betty prenas 5, ĉar $5+7=12$.) Tiel iam oni iam forprenis 88 ($4 + 7 \times 12$) kaj restos 12 moneroj. De tiu punkto estas videble, ke tutegale kiun kvanton ludanto (2) prenos, la sekva ludanto (1) povas ĉiam preni la lastan moneron).

Vortoj de la monato

Hodiaŭ mi prezentas kvar vortojn el NPIV, kiuj foje estas intermiksitaj, kvankam (aŭ eble ĝuste: ĉar) en la germana ni havas sufiĉe similan distingon:

procezo - Sinsekvo de fenomenoj, disvolviĝanta, rigardata en sia tuteco, iompostioma progresado k finaj rezultoj (germ. *Prozess*, als *Verlauf einer Entwicklung*)

proceso - Juĝafero, jure submetita al tribunalo (germ. *Gerichtsprozess*) / anatomie: Elstarajo, pli elstara parto de organo (germ. *Vorsprung*, z.B. bei Knochen)

procedo - Agmaniero, aplikota por atingi difinitan rezulton, k speciale farmetodo sekvata por fabriki, presi, foti k.a.

proceduro - Maniero, en kiu estas kondukataj aferoj konforme kun la kutimo, statuto, reglamento aŭ leĝo

Ŝerco

En vagonara kupeo:

„Kion vi maĉas la tutan tempon?“

„Semojn de pomoj.“

„Ĉu ili bonas?“

„Nu, ili plibonigas la inteligentecon.“

„Ho, ĉu mi rajtas havi kelkajn?“

„Certe. Kvar semoj kostas 4,80 eŭrojn.“

Post paŭzo:

„Kontraŭ 4,80 eŭrojn mi povintus aĉeti tutan kilogramon da pomoj!“

„Vidu, la semoj jam efikas!“